Ŝajnas, ke la specigo de la tem-komplekso estis tro vasta kaj ĝenerala. La aliĝintoj ne sciis, kion fari, kiel partopreni. La sekciestroj estis pasivaj. Por **interlinvistiko** aliĝis ses personoj kaj por **esperantologio** la samaj plus pluaj kvar, sed ili ne sciis, pri kio okupiĝi, ne helpis konsiloj kaj rekomendo de literaturo. La aliĝintoj silentis.

Por **pedagogiko** aliĝis ses personoj, la sekcia zorganto alparoladis ilin nur pere de „Letero de ELFo“, sed neniu el ili iniciate reagis.

En **literatura** sekcio inkluzive de la **poetika** estis dek unu aliĝintoj, kies verka aktivado estis tre modesta, planata eldono de „Jarkolekto ELFo 2006“ ne okazis pro nesufiĉaj kontribuoj. Intereso montriĝis pri tradukado, malpli pri originala verkado, supozeble pro la emo lingve perfektigi lige kun la gepatra lingvo.

La **leksikografia** (vortarista) sekcio konsistis el sep personoj, kelkaj el ili vere eklaboris, bedaŭrinde sen serioza kaj efika kunlaboro. Ĉiuj laboris izolate.

Interese estas, ke al **terminologia** sekcio aliĝis dek du interesitoj, sed instigitaj fiksi por si konkretan malvastan fakon por praktike ekzerci la fakon laŭ internaciaj principoj, aliĝis el ili nur unu. Kaj tiu ne sciis akcepti terminologian procedon, terminologian laboron li imagis kiel tradukadon de oficialaj (ŝtataj) dokumentoj.

En la **historia** sekcio estis kvar membroj, sed rezulto de ilia agado estas nula.

Ĉu post la du jaroj ekzistas entute io pozitiva? Jes, ekzistas. Montriĝis evidenta intereso pri la lingva faco de Esperanto. En la **lingvo-teorian** sekcion aliĝis sume dek unu membroj, kiuj parte mem proponis kaj ankaŭ traktis specifajn temojn (en „Letero de ELFo“ aperis kelkaj eseoj), ofte ili demandis pri problemoj leksikaj kaj gramatikaj. La interesiĝo kaŭzis specialan rubrikon en „Letero de ELFo“, nomitan „Problem-solvejo“, en kiu la problemoj estis diskutataj, ofte ripete en la daŭro de kelkaj monatoj, ĝis konkreta rezulto. Traktitaj estis sume 59 temoj.

Kadre de la lingva sekcio, en „Letero de ELFo“ aperis konciza ĉeflingva prezento de vortfarado en Esperanto laŭ PAG. Por homoj sen lingvistika erudicio estas la nacilingva versio pli komprenebla kaj efika.

En lingva ekzercado helpe de nefacilaj tekstoj tradukotaj en Esperanton partoprenadis dek kvar membroj, la analiza prijuĝo kaj komparo de ricevitaj tradukoj aperadis en „Letero de ELFo“, profite por ĉiuj.

En **poetiko** estis laŭ krea maniero aktivaj du membroj, *Jaroslav Krolupper* kaj *Zdeněk Rusín* (pluraj iliaj verkoj estas publicitaj). Iumaniere kun ili aktivis kelkaj pluaj membroj, kiuj la verkojn konsulte legis kaj ankaŭ organizis kontakton al aŭtoroj – ĉefaj poetoj (*Věra Bartošková*, *Zdenka Bergrová*, *Marie Dolistová*, *Věra Ludíková*, *Alena Melicharová*). En ELFo membras ankaŭ la ĉefa poeto *Čestmír Vidman*, mem esperantisto.

Pli-malpli individue, en pozitiva cenco, kelkaj membroj daŭrigas jam pli frue komencitan laboron **vortaristan**, aŭ nove eklaboris pri temoj iniciatitaj en ELFo: granda elektronika vortaro ĉefa-esperanta (*J. Hron*), arĥitektura kaj konstrufaka vortaro kvarlingva (*J. Werner*), gastronomia (*M. Ribasová*, *M. Turková*) kaj ĥemia (*Z. Pluhař*) vortaroj. Suplementon al la ĉefa-esperanta vortaro de *K. Kraft* (1998) komencis prilabori *M. Malovec*.

Konkludo post du jaroj

La ELFo-speca iniciato en Ĉeĥio ne povis en la kurta dujara etapo plene evolui kaj sukcesi, ĉar en la nova socipolitika situacio la civitanoj preferas okupiĝi pri aferoj, kiuj al ili dum la pasintaj 41 jaroj mankis – eksterlanda vojaĝado, entreprenado. Krome mi vidas ankaŭ kaŭzon psihologian. De post 1938, dum kaj post la 2-a mondmilito, homoj kutimiĝis vivi izolite, ne riski malfacilaĵojn pro sia kaŝita disidenteco al la politika reĝimo, ili timis. Homoj estas ankoraŭ nun fermitaj kaj inklinas al individuismo. Estas malfacile en ili vekti sinceran kunlaboremon. Ili, amatoroj, ne konscias, ke perfektan verkon estas bezone prilaboradi en la medio de kolektiva frontado de ideoj kaj oponado de detaloj. Pro tio la sekcioj vegetis.

Alia sperto: Por eduki novan eliton estas necese konduki interesitajn homojn al elekto de nur malvasta segmento, temo. En la eksperimento ELFo mi spertis, ke pluraj aliĝintoj ne sciis elekti kaj deklaris, ke ili interesiĝas pri ĉio. Bedaŭrinde, ilia utilo estas nur parta, ili inklinas al babilemo pri ĉio ajn, sed supraĵe. Por iniciato de ELFo-tipo estas preferinde ne proponi sekciojn kun vasta laborhorizonto, sed konkretajn, iel limigitajn programojn, kiuj vekus intereson de kelkaj personoj. Ili poste mem interkonsentu pri agad-metodo, la gvidmaniero el centro rilate al libervola grupiĝo estu milda, pli konsulta ol administra.

ELFo estis libervola kaj sendependa organizo sen jura personeco. Al ELFo estis invitataj ankaŭ kelkaj funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ili la iniciaton ignoris, kialon mi ne scias diri. Du privataj voĉoj admonis: Kial vi ne organizas ELFon kadre de ĈEA? Kial? Pro simpla sendependeco, sen aprobado, sen raportado. Pro evito de burokratismo, kiu ĝenas.

La ideo de ELFo estas principe bona, sekvida, ne nepre por ĉiuj esperantologiaj kaj literaturaj subfakoj. La ĉefa trajto de ELFo estis (estas) eduko al kreado de kulturaj valoraĵoj kaj samtempe al kvalita leviĝo de la movado. Unu apartan kvazaŭ ELFo-grupon mi prizorgas sur la tereno de mia profesio – Konstru-Forumon. Pri ĝi vidu apartan komunikon.

Brno, 2008-04-07

2.2 Faklingva iniciato Konstru-Forumo

Jan Werner

„Konstru-Forumo“ estas internacia profesia grupo, kiu elkreskis el la aŭtora kolektivo post prilaboro kaj aperigo de kvarlingva „Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj“ (2002). La 40-paĝa kajero estas verko de kvin konstrufakuloj el Ĉeĥio, Germanio, Nederlando, Slovenio, antaŭ eldono recenzita de fakuloj franca kaj rusa. Ĝi estas verko sistema, bazita strikte sur la internaciaj terminologiaj principoj. El tiu vidpunkto ĝi estas verko modela, pri ĝia vastigo al la lingvoj hungara, pola kaj slovakaj por bezonoj de la eŭrounie kunlaboranta landa grupo V4 pozitive traktis inĝenieraj ĉambroj de Hungario (iniciatinto), Slovakio kaj Pollando; la ĉeĥia ĉambro la planon bedaŭrinde ne akceptis.

La faklingvoj de Esperanto por teknikaj kaj metiaj branĉoj ne evoluas, ilia stato eĉ baras internacian kompreniĝon de fakuloj. La konstrua fako, en kiu abundas specifaj metioj, bezonas seriozan prilaboron de multaj dekoj da terminaroj. La esperantista movado ne kapablas tion plenumi, eĉ ne konscias tian bezonon. La aludita aŭtora kolektivo almenaŭ konscias la staton kaj decidiĝis per siaj modestaj fortoj eliminadi la plej evidentajn breĉojn – vakaĵojn en la faklingvoj koneksaj al konstrufako kaj arĥitekturo.

La originan aŭtoran grupon envenis kelkaj novaj personoj, du francoj, du hungaroj, ruso, partoprenas ankaŭ kroato orientita al fervojfaka ekonomiko. Bedaŭrinde mortis nia germana kunlaboranto. Grave mankas al ni reprezentantoj el lingvaj teritorioj angla, hispana kaj germana, kompreneble utilis ankaŭ membroj ekstereŭropaj.

La ĉefa laboro de la forumo estas proponi solvotajn problemojn, analizi kaj difini nociojn, proponi kaj taksu nomojn, decidi interkonsente. Montriĝas problemoj en difinado de nocioj, ĉar sub iu termina skribformo ĉu angla, germana aŭ franca ne malofte aperas enhavo diferenca en niaj gepatraj lingvoj. Ĝuste preciza difino de nocio estas la tasko primara, pli grava kaj pli komplika ol la elekto de esperanta termino. La vaste internacia konsisto de la forumo tre gravas. Individuo el kiu ajn nacio, konsistiganta esperantan terminaron de sia fako, ne povas veni al ĝenerale utila rezulto. La ekzistantaj t.n. „terminaroj“ havas minimuman valoron pro du kialoj: 1. ili ne estas sistemaj, ili reale estas nur alfabete ordigitaj vortaretoj, ne terminaroj, 2. ili estas verkoj de unuopuloj. Supozeble ankaŭ la sekcio pri teknika vortaro de la Akademio, sub gvido de *Mark Bavant*, establiĝinta en 2005, ne scias en la faklingva marasmo orientiĝi, membroj de tiu sekcio probable ne konscias esencon de la „teknika vortaro“, ne estas terminologie edukitaj.

Konstru-Forumo ne estas ies sekcio, ĝi estas sendependa aga iniciato programe aliĝanta al TAKE (Tutmonda Asocio de Esperantistaj Konstruistoj). Konstru-Forumo ne havas grandiozajn planojn, sed kontinue laboras pri ŝajne bagatelaj detaloj, kiuj estas pli gravaj ol ies konferencaj aŭ kongresaj entuziasmigaj paroladoj.

Ni iniciatis, ke TAKE eldonadu jarlibron, en kiu aplikiĝos nia terminaro. La unua jarlibro aperis tuj en 2005, redaktita de *Jan Werner* (CZ), en 2006 la jarlibron redaktis *Fabien van Mook* (NL), en 2007 *Bronislav Ĉupin* (RU) kaj nunjare zorgas pri ĝi *Đorđe Obradović* (SI). Presata kaj distribuata ĝi estas ĉiam en Francio, en la centro de TAKE.

En la daŭro de tri jaroj ni okupiĝis precipe pri faklingvaj problemoj, kiuj parte rilatis al unuopaj nocioj, parte al nevastaj nocio-kompleksoj. Provizore ni ne laboras laŭ iu longtempa

plano, la problemojn ni envicigas en la momento de ilia apero, do spontane. Tiu stato ne estas ideala, sed ĝi fontas el nia limigita laborpovo.

Kiel izolitajn ni traktis nociojn/terminojn: materialo *kompozito*, konstruelemento nefervoja *ŝpalo*, apud la nocioj urboplanado kaj urbaniz(ad)o ni decidis pri la fako *urbanismo*, pri la stilo *secesio*, supra ŝtupa faco *tretejo*, vertikale libera *lumspaco* en ŝtuparejo, historia domo kun karakteriza ligna strukturo en fasadoj estas *trabfaka domo*, unuopajn elementojn de trabfaka domo ni ekipis per nomoj: *ŝpalo, sojlo, girto, solivo, fosto, ŝtrebo*. Ni traktis, ĉu por certa statika nocio enkonduki la terminon *streni*, sed ni kontentiĝis pri *deformi*. Por la fako statika ni plu interkonsentis kaj difinis: *ŝarĝo, punktoŝarĝo, forto, streĉo, tensio, kniko, laciĝo, subtenilo, subtena reakcio, kondiĉoj de ekvilibro, fleksa momanto, translacia forto, normala forto, premdifekto*. Por difektoj de ŝtalaj konstruktoj ni difinis *lokan knikon* kaj *kip(ad)on* (tute nova termino laŭ la germana). Ni ordigis la ĥaoson (PIV) inter *latiso* kaj *truso*. Novan terminon ni interkonsentis anstataŭ iama propono de F. Azorin (kvoto, kvoti) *koteo, kotei*. Ni revenis al la nomo *edifiko*, ĉar la komunuzaj nomoj domo kaj konstruaĵo estas nesufiĉaj.

En la nuna tempo ni solvas nomon por trafluanta kvano de substanco (gasa, likva), proponitaj estas: *trafluo, fluokvanto, debito, spezo*. Ni klopodas trovi internacie difineblan nocion por bitumo kaj asfalto, ĉar la naciaj vidpunktoj diferencas. Lanĉitaj estas proponoj *spanejo* (parto de domo), *titolkampo* kaj *legendo* sur desegnaĵoj. Ni serĉas nomon por specifa luzacia historia domo nomata en la germana „*Umgebendehaus*“. Iniciate de franca specialisto pri tegmentoj ni eble komencos prilabori terminaron por tegmentoj kaj ladistan terminaron.

Konstruado kaj arĥitekturo estas fakoj eksterordinare vastaj, neniuj konstrufakulo estas kompetenta pri ĉio en tiu fako. Pro tio ni bezonas esti pli nombraj, ni serĉas kunlaborantojn tra la mondo, sed preskaŭ vane, esperantistaj fakuloj estas ankaŭ simplaj homoj, kiuj preferas amikiĝi, dediĉi sin al hobiaj, ripozi. Mi rekomendas, ke vi provu trovi evoluigon de via faklingvo kiel hobion kaj aventuron. Se via profesio iel rilatas al konstrufako, aliĝu ĉe: *Jan Werner*, Dřínová 18, CZ-61200 BRNO; wernerjan@seznam.cz.

3 Kolekto pri terminologia agado en Esperanto de Wera Blanke

Ĝus aperis baza verko pri terminologio kaj terminologia agado en Esperanto:

Blanke, Wera (2008): Esperanto - Terminologie und Terminologearbeit. (Esperanto – terminologio kaj terminologia laboro) New York: Mondial, ISBN: 9781595690777, 156 paĝoj; granda: 8.5" x 5.5"

La libro de Wera Blanke entenas tekstojn skribitajn en la germana kaj la angla pri la rilatoj inter Esperanto kaj la evoluo de la internacia terminologia laboro, inter alie pri la roloj de la interlingvistoj *Eugen Wüster* kaj *Ernest Drezen* (k.a.) koncerne la formigon de terminologia scienco kaj pri la stato de terminologiaj klopodoj ene de la Esperanto-movado.

Jen la enhavo:

- Inhalt / *Enhavo*:
- Vorwort/*Antaŭparolo* (Sabine Fiedler)
- Vorbemerkung /*Antaŭrimarko*
- Plansprachen als Fachsprachen – unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto/*Planlingvoj kiel faklingvoj – sub aparta konsidero de Esperanto*
- Terminological standardization – its roots and fruits in planned languages/ *Terminologia normigado – ĝiaj radikoj kaj fruktoj en planlingvoj*
- Terminologia Esperanto-Centro: Efforts for Terminological Standardization in the Planned

- Language / *Terminologia Esperanto-Centro: Klopodoj por terminologia normigado en la planlingvo*
- Über den Beitrag von Interlinguisten zur Organisation internationaler Terminologiearbeit/ *Pri la kontribuo de interlingvistoj al la organizado de internacia terminologia laboro*
 - Plansprachliche Anregungen für Terminologen – Wüster – Drezen – Warner – eine Skizze/ *Planlingvaj sugestoj por terminologoj – Wüster – Drezen – Warner – skizo*
 - Probleme der Organisierung terminologischer Aktivitäten in Esperanto/ *Problemoj de organizado de terminologiaj aktivaĵoj en Esperanto*
 - Im Text und im Literaturverzeichnis verwendete Abkürzungen / *Mallongigoj en la teksto kaj literatura listo*
 - Literatur / *Literaturo*

La eldonejo Mondial informas pri la Kie aĉeteblo de siaj libroj:

En la [reta librovendejo de Mondial](#) (sendota el Usono aŭ Britio, pago per kreditkarto, usona ĉeko, bankĝiro al germana aŭ usona banko, aŭ al nia UEA-konto-move-x).

Ĉe [UEA](#) aŭ via kutima libroservo.

Ĉe [amazon.com](#) en Usono (kreditkarto).

Ĉe [barnesandnoble.com](#) en Usono (kreditkarto).

Ĉe [amazon.ca](#) en Kanado (kreditkarto).

Ĉe [amazon.fr](#) en Francio (kreditkarto).

Ĉe [amazon.de](#) en Germanio (kreditkarto).

Ĉe [amazon.co.uk](#) en Britio (kreditkarto).

Ĉe [amazon.jp](#) en Japanio (kreditkarto).

En iu ajn librovendejo de la mondo konektita kun la internacia perkomputila mendoreto; simple donu al la vendisto la ISBN-numeron de la libro (vidu supre!). Krome, kompreneble, la libro estas aĉetebla ĉe UEA kaj aliaj bonaj esperantaj libro-servoj.

4 En la reto

4.1 Promocio de Esperanto ĉe Google

Marek Blahuš

Mi deziras raporti pri unu gravega atingo de Esperanto sur la kampo de interreto, pri kiu tamen ĝis nun apenaŭ aperis informoj en la Esperanto-komunumo. Unue mi aŭdis pri ĝi de *Toon Witkam*.

Ĉu vi rekonas la vortojn "kaj estas", eventuale "kaj la estas"? Jes, ilin oni uzis en serĉiloj kiel Google aŭ Yahoo kiel aldonon al la efektive serĉata esprimo, por elfiltri el la tuta reto nur la esperantlingvajn paĝojn kaj en tiuj serĉi. Tiu solvo funkciis relative kontentige. Ekde kelkaj monatoj tamen, tiaj vortoj ne plu estas necesaj, ĉar Google decidi aprezi la Esperanto-komunumon, aldonante Esperanton kiel unu el la lingvoj laŭ kiuj eblas filtrigi la rezultojn de serĉo.

Atentu, ke ne temas pri la ebleco vidi la retpaĝaron de Google en Esperanto! - tio jam eblas ekde longa tempo kaj da tiaj lingvoj estas pli ol cent, inkluzive de interlingvao (Interlingua) kaj por la Latino.

La nova decido de Google envicigas Esperanton inter nur 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata serĉo. Tial la robotoj de Google nun trairante la reton aŭtomate rekonas retpaĝojn skribitajn en Esperanto kaj dum serĉado ebligas al la uzanto serĉi nur ene de ili. Saman pozicion kiel nun Esperanto ankoraŭ ne havas en Google tiom grandaj lingvoj kiel la hinda, la bengala, la latina, la afrikansa, aŭ la svahila. Cetere, Esperanto estas la sola planlingvo tiel agnoskita.

Por serĉi per Google nur esperantlingvajn paĝojn, uzu la adreson;:

http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo

Gravas en la adreso la teksto "&lr=lang_eo" ĉe la fino - tiu limigas la rezultojn al esperantlingvaj paĝoj. Se vi aldonas ĝin finen de adreso de ajnaj serĉrezultoj en Google, tio montros nur tiujn rezultojn kiuj estas skribitaj en Esperanto. Laŭ la provizataj informoj, ŝajnas ke Google nun kapablas serĉi ene de pli ol 2.680.000 esperantlingvaj paĝoj. Tio donas bonan bazon ankaŭ por utiligo de Google kiel granda korpuso de Esperanto.

(Marek Blahuš marek@ikso.net)

4.2 Esperantologio en la reto – la elektronika revuo Lingva Kritiko

En IpI 64 (1/2008), p. 9 ni daŭrigis la listigon de esperantologiaj artikoloj, kiuj aperis en la reta revuo Lingva Kritiko, redaktata de Bertilo Wennergren:

- 26 „Ĉu dua vivo por tempismo?“ (ata/ita, Bertil Wennergren)
<http://lingvakritiko.com/2008/02/13/chu-dua-vivo-por-tempismo/>
- 27 „Demandeto pri 11.6.1. de PMEG“ (Ken Miner, refleksivo si)
<http://lingvakritiko.com/2008/01/12/demandeto-pri-1161-de-pmeg/>
- 28 „El-interna kaj el-ekstera vortprovizo – analizo de la diskuto“ (Marcos Cramer, vortfarado, neologismoj)
<http://lingvakritiko.com/2008/03/03/el-interna-kaj-el-ekstera-vortprovizo/analizo-de-la-diskuto/>
- 29 „Kuri / kuranta /kurantan: alia diferenco inter participoj kaj ordinaraj adjektivoj.“ (Ken Miner)
<http://lingvakritiko.com/2008/03/21/kuri-kuranta-kurantan-alia-diferenco-inter-participoj-kaj-ordinaraj-adjektivoj/>
- 30 “Ĉu siĥo aŭ siko?” (Bertil Wennergren, pri hinddevena vorto)
<http://lingvakritiko.com/2008/04/14/chu-sihho-au-siko/>
- 31 “Odo al Saĝaj Malpruduloj: La Granda Salto Antaŭen” (Petro de Smedt, pri novaj radikoj, oficialigitaj de la Akademio de Esperanto)
<http://lingvakritiko.com/2008/04/15/odo-al-saghaj-malpruduloj-granda-salto-antaufen/>

4.3 Aŭtomata tradukilo al Esperano

Kiel informis la islanda esperantisto *Stefán Briem* (stbr@simnet.is) en la Interreto troviĝas servilo por senpaga maŝina tradukado inter la islanda kaj tri aliaj lingvoj (Esperanto, angla, dana):

<http://www.tungutorg.is> .

5 Simpozio en Kolkato

En la 18a de januaro 2008 okazis unutaga internacia simpozio pri la kogna lingvistiko en la Lingvistika Labora Ejo de la Barata Statistika Instituto en Kolkato. Prelegis du lingve interesitaj komputikistoj (*Anupam Basu*, Barata Instituto pri Tekniko, Kharagpur, kaj *Sivaji Bandyopadhyay*, universitato Jadavpur, Kolkato), unu psikolingvisto kiu ebligis la adjektivon "internacia" (*Arpita Bose*, universitato de Windsor, Kanado) kaj du lingvistoj (*Mina Dan*, universitato de Kolkato, kaj *Probal Dasgupta*, Barata Statistika Instituto). Partoprenis kvardeko da gestudentoj el la universitato de Kolkato, al kiuj *Dasgupta* prelegserias pri la psikolingvistiko. La prezentoj estis alstudentaj.

Basu okupighis pri la automata generado de natura lingvaĵo kun aparta atento al la sintakso kaj la diskurso. *Bandyopadhyay* skizis la komputikan aliron al la identigo de intervortaj semantikaj rilatoj, precipe en ligo kun WordNet. *Bose* prezentis rezultojn el sia laboro kun Broka-afaziaj pacientoj. *Dan* konatigis lastatempajn rezultojn en la bengala fonologio, uzante aliron bazitajn sur morfologiaj kaj fonologiaj strategioj. *Dasgupta* reliefigis ne nur la rolon de Esperanto en la siainstituta projekto pri generado de leksiko (aktuale nur por la bengala) -- kiu establas leksikan kernon kaj eksplicite rilatigas al ĝi la periferiajn leksikerojn, kaj kiu uzas Esperanton kiel glosilon klarigantan la strukturon de la ligoj inter kerneroj kaj periferieroj -- sed ankaŭ la rilaton de tiu laboro al la Internacia jaro de lingvoj. Li emfazis, ke Esperanto kiel glosila lingvo helpas travidebligi la derivajn rilatojn, kiuj estas ofte malklaraj en la formoj de la etnalingvaj vortoj. Li ligis tiun ĉi utilon de Esperanto al ĝia propedeŭtika rolo, proponante por Esperanton pli vastan fakan uzon kiel vorto-strukturan klarigilon paralelan al la internacia fonetika alfabeto por la fonetikistoj. Li atentigis, ke la parta artefariteco de Esperanto tre similas al tiu de la internacia fonetika alfabeto (kiu ne konsistas el bildetoj de la parolilaro, sed el modifoj de la latina alfabeto).

La alparolado al tiuj gestudentoj daŭros en februaro, do eblos interreagi kun ili surbaze de demandoj - en ilia propra universitato. Mi havas la impreson, ke la evento estis sukcesa.

Probal Dasgupta
Linguistic Research Unit
Indian Statistical Institute
203 B.T. Road
Kolkata 700108, India
tel. +91-9831815042

6 Novaĵoj de Wim Jansen

6.1 Lernolibro por la eŭska lingvo

Kiel konate la inĝeniero pri spacveturado kaj interlingvisto *doc. d-ro Wim Jansen* ankaŭ estas unu el la tre malmultaj nederlandaj specialistoj por la eŭska lingvo.

En 2002 aperis lia anglalingva lernolibro por la eŭska lingvo:

Jansen, Wim (2002: *Beginner's Basque* (Hippocrene Books Inc., New York). Lehrbuch Baskisch für englischsprachige Anfänger. 283 p.

La dua eldono ĵus aperis, do en 2008, kun aldonita kompaktdisko.

6.2 Nederlandaj pruntvortoj en aliaj lingvoj

Sub la egido de Nederlanda Lingvo-Unio (*Nederlandse Taalunie*: NTU), la nederlanda ŝtata organizaĵo, kiu okupas sin pri la nederlandaj lingvo kaj kulturo, estas preparata ampleksa datumbazo kun nederlandaj pruntvortoj en multaj lingvoj tutmonde. En 2009 tiu ĉi kolekto estos senpage disponigita en la interreto por studaj kaj esploraj celoj. Eble ĝi aperos ankaŭ kiel presita libro. *D-ro Wim Jansen*, docento pri interlingvistiko/Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, fariĝis kunlaboranto en tiu ĉi granda projekto por la identigo de eventualaj nederlandaĵoj en la eŭska lingvo kaj Esperanto. La enkorpiĝo de Esperanto en la grandan datumbazon de NTU estas plia pruvo pri tio, ke oni konsideras nian lingvon digna studobjekto. Ni memorigu pri du gravaj lastatempe publikigitaj verkoj pri la nederlanda lingvo, en kiuj aperas seriozaj mencioj pri Esperanto, nome en *Taal als mensenwerk. Het ontstaan van het ABN* [La lingvo kiel homa produkto. La estiĝo de la norma nederlanda] kun citaĵo sur p. 607 de Zamenhof el la Aldono al la Dua Libro, kaj en *Klein Uitleenwoordenboek* [Vortareto de Pruntitaĵoj] kun diskuto sur p. 124 pri *melk* ‘lakto’ en la nederlanda kaj la verbo ‘melki’ en Esperanto.

Bibliografio:

Sijs, Nicoline van der. 2004. *Taal als mensenwerk. Het ontstaan van het ABN*. Hago: SDU. 718 p.

Sijs, Nicoline van der. 2006. *Klein Uitleenwoordenboek*. Hago: SDU. 206 p.

7 Bengt-Arne Wickström – 60-jara

Bengt-Arne Wickström estas profesoro pri ekonomiko de la publika sektoro ĉe Humboldt-Universitato en Berlino. Li ankaŭ profesoras en la “Akademio Internacia de la Sciencoj” (AIS) San Marino. Antaŭe li estris katedrojn ĉe Johannes-Kepler-Universität en Linz, Aŭstrio, kaj ĉe la Universitato de Bergen, Norvegio; li krome servis kiel vicprezidanto de la Germana instituto por ekonomia esplorado (DIW, Deutsches Institut für Wirtschaftsforschung, Berlin).

Li doktoriĝis pri ekonomiko en State University of New York en Stony Brook, Usono. En sia esplorkoncepto li pritraktis la teorion de bonfarto – principe la ekonomikan teorion de justeco –, la ekonomikan teorion de politiko, la interrilatojn inter ekonomiko, lingvo kaj socio. Krome li interesiĝas pri la estiĝo kaj evoluo de sociaj normoj kaj ilia rilato al la evoluo de la socio.

Lastatempe liaj laboraĵoj aperis inter alie en *Rationality and Society*, *European Journal of Political Economy*, *Homo oeconomicus*, *Journal of Economics*/*Zeitschrift für Nationalökonomie*, kaj *Public Choice*.

Jen elekto de verkoj kun interlingvistika intereso:

- Ekonomiaj teorioj pri justeco. *Scienca revuo*, 39 (1988) 3 – 16.

- Equilibrium selection in linguistic games: Kial ni (ne) parolas esperanton? (Kun Werner Güth kaj Martin Strobel) *Understanding Strategic Interaction: Essays in honor of Reinhard Selten* (Wulf Albers k. al., eld.). Berlino ktp.: Springer (1997) 257 – 269.

- Kio estas kostoj kaj utilo de lingvouzo? La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado (R. Selten, eld.). Romo: „Esperanto“ radikala asocio (1997) 5 – 13.

- Quali sono i costi e l'utilità dell'uso di una lingua? I costi della (non)comunicazione linguistica europea (R. Selten, eld.). Romo: „Esperanto“ radikala asocio (1997) 5 – 13 (Italiĝo de 3).

- What are the costs and benefits of the use of a language? The costs of European linguistic (non)communication (R. Selten, eld.). Romo: „Esperanto“ radikala asocio (1997) 6 – 14 (Angliĝo de 3).

- Can bilingualism be dynamically stable? A simple model of language choice. *Rationality and Society*, 17 (2005) 81-115.

- Fairness, rights, and language rights: On the fair treatment of linguistic minorities. *Public Economics and Public Choice: Contributions in Honor of Charles B. Blankart* (P. Baake kaj R. Borck, eld.). Berlino ktp.: Springer (2007) 81 – 102.

8 Fake en brazila televida stacio

De 24.12.07 – 20.1.2008 *Wera* kaj *Detlev Blanke* restadis en Brazilo, ĉefe en „Bona Espero“. Ili krome vizitis la televidan stacion „Supren“ en la ĉefurbo Braziljo, kiu emisias multajn programojn pri kaj en Esperanto. La programoj en Esperanto ĉefe estas intervjuoj faritaj kun esperantistoj, poste subliniataj portugallinge. La direktoro kaj posedanto de la stacio estas la konata brazila advokato *Ulysses Riedel*, kiu antaŭ la prezidanteco de *Lula* gajnis kelkajn procesojn kontraŭ la brazila ŝtato defende al la sindikatoj. Riedel estas prezidanto de la organizaĵo “Unio Planeda” kaj havas la koncepton, ke lia TV-stacio emisiu ĉefe alternativajn programojn, laŭ li pozitivenhavajn. Al tio ankaŭ apartenas Esperanto. Ulysses Riedel estas granda amiko de Esperanto, oficiale eĉ la ĝenerala direktoro de Bona Espero kaj pro tio multe subtenas tiun bonfaran institucion esperantan. Li ankaŭ partoprenis universalan kongreson, kun sia edzino. *Paulo Nascentes* estas universitata instruisto, kiu i.a. gvidas kursojn de Esperanto en la ŝtata brazilja universitato. Li ankaŭ estas la ĉefa esperantista kunlaboranto de la stacio. Al la kunlaborantaro de la stacio ankaŭ apartenas kelkaj aliaj esperantistoj, kiuj edukiĝis en “Bona Espero”. Jen la teksto de Paŭlo Nascentes - Red.:

La germana lingvisto *Detlev Blanke*, fakulo pri Esperantologio kaj Interlingvistiko, kaj la edzino *Wera Blanke*, kiu fakas pri terminologio, vizitis la 19-a de januaro 2008 la sidejon de Unio Planeda kaj TV Supren kune kun *Ursula Grattapaglia*, direktorino de Lernejo-Bieno “Bona Espero” (Alto Paraíso – GO). La ĝenerala temo de ilia intervjuo en nia televida studio (Lago Norte/Brasilia) estis "La signifo de scienco por la progresigo de Esperanto". Inter alie *Detlev Blanke* klarigis pri diferencoj inter esperantologio kaj interlingvistiko, la rilato de lingvistoj pri Eo, lingvopolitikaj kaj lingvofilozofiaj aspektoj (artefariteco kaj lingvoplanado), lingvo-politiko, respondo la demando kial Esperanto (mal)sukcesis ktp. *Wera Blanke* parolis pri kampo ofte neglektata, la faka apliko de Esperanto, aparte pri fakvortoj, la terminoj. Laŭ kiuj principoj oni faru fakvortojn?

Informis: Paulo Nascentes. Esperanta Nukleo de Unio Planeda/TV Supren (pnascentes@gmail.com)

9 Novaj libroj

9.1 La aktoj de la 5-a Nitobe-Simpozio

La 5-a Nitobe-Simpozio okazis de 2.-3. August 2007 en Tokio. La aktoj aperis:

Kimura, Goro Christoph/ Yoshida, Naoko (2008, Red.): Al justa lingvopolitiko en Azio. Aktoj de la 5a Nitobe-Simpozio. Towards Equitabele Language Policy in Asia. Proceedings of the 5th Nitobe Symposium. Tokio: European Institue, Sophia University/ Japana Esperanto-Instituto, 217 S. (ISBN 978-4-88887-054-2).

9.2 Aktoj de konferenco pri propedeŭtiko en Moskvo

La 13-an de aprilo 2007 en Moskvo okazis konferenco, kiu traktis la rolon de Esperanto kiel propedeŭtiko por la fremdlingva instruado. Jen la aktoj:

Samodaj, Vladimir/ Tuĥvatullina, Liana/ Ŝevĉenko, Dimitr (2007, Red.): Ĝesperanto – nailu-ĉŝaja propedevtika. Esperanto – la plej bona propedeŭtiko. Moskva: Evropejskij universitet Justo/ Eŭropa Universitato Justo, 152 S. (ISBN 978-5-7161-0179-1) (en la rusa kaj Esperanto)

9.3 Pri lingva instruado kaj edukado

Jen interesa libro de *prof. Timothy Reagan*, en kiu li i.a. pritraktas problemojn de lernado de fremda lingvo:

Reagan, Timothy (2005): Critical Questions, Critical Perspectives: Language and the Second Language Educator. Greenwich (Connecticut): IAP, 145 p.

En la ĉapitro 6 "Language Learning and Feelings of Disgust ? (p. 77-102) la aŭtoro prezentas Esperanton.

9.4 Rusa libro pri historiaj temoj

Aperis jena libro:

Oleg Krasnikov/ Detlev Blanke (2008): Esperanto-dviĝenie: fragmenty istorii. Moskva: Impeto, 215 p., ISBN 978-5-7161-0178-4, ilustrita.

La volumo entenas du partojn:

I

Oleg Krasnikov: Historija sojuzo esperantistov sovetskich respublik (p. 7-114): (Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio, SEU).

Oleg Krasnikov (*1937) estas la unua, kiu klopodas detale prezenti la historion de SEU, de la komencoj ĝis meze de la 1930aj jaroj. Esperanto-traduko preparatas kaj espereble iam aperos.

II

Detlev Blanke: Historija raboĉevo esperanto-dviĝenija (IPE, EKRELO, esperanto i socializm), p. 115-215.

Anatoli Sidorov ruslingvigis la kontribuojn de Detlev Blanke (*1941). Temas pri la historio de Internacio de Proleta Esperantistaro, IPE, 1932-1939, la sovetia-germana Esperanto-eldonejo EKRELO (Eldonkooperativo de Revolucia Esperanto-Literaturo, 1930-1936, kaj la rusa versio de la broŝuro "Esperanto kaj Socialismo? Pri la movado sur la 'alia flanko' " (New York: Mondial 2007, 64 p., laŭ la dua korektita eldono).

La esperantlingva originalo pri IPE aperis en: Detlev Blanke (Red.): "Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-movado". Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio 1978 [dua eldono 1986], p. 50-62.

La teksto pri EKRELO aperis en la germana varianto en: Ino Kolbe: "Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig". Leipzig: Landesverband Sachsen des DEB, 1996 (Blanke en Parto II, p. 69-78).

La esperantlingva varianto de la studo pri EKRELO aperis en :En: Zajcev, Igor/Ŝevĉenko, Aleksandr (Red., 1991): Impeto '91. Moskva: Progres, p. 69-89.

10 Redakta informo

En numero 64 de Ipl ni publikigis la ampleksan rezolucion de Unuiĝintaj Nacio pri Plurlingvismo (p. 20-24). Al mi ne estis klare kiu tradukis la dokumenton. Kiel mi eksciis, la dokumenton tradukis *Daniela Tagliafico*, ĝin reviziis *Renato Corsetti*- Red..

11 Angla enciklopedio pri la originala literaturo de Esperanto

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snaflu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas.
